

BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE
OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.



No 7.

Oktoebro 1953

Aperas laŭbezone

SOMERA ESPERANTO - KOLEGIO EN K O S T (DOKSY).

Kastelo Kost estas bone konservita ĉeĥa kastelo el epoko de gotika stilo. Ĝi estis fondita verŝajne en la mezo de 14a jarcento. Ĉirkaŭita de belega regiono ĝi situas (4 km de Sobotka) sur la roko, kiel punkto, kiun tuŝas tri belaj valoj. Sub la kastelo, borderitaj de arbaroj kaj herbejoj estas du fiŝlagoj, en kies akvoj respeguliĝas belaj konturoj de la kastelo. El Kost oni facile atingas ĉiujn vidindaĵojn de regiono "Ĉeĥa paradizo".

Kaj en ĉi tiu belega loko okazis de la 5/8 ĝis 15/8 ĉijare Somera Esperanto-kolegio, kiu pro teknikaj kaŭzoj ne povis okazi en tradicia urbo Doksy. Estis ŝanĝita loko, sed bona tradicio de SEK restis - malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj. La kolegion partoprenis 50 gelernantoj el ĉiuj partoj de la respubliko, precipe el Slovakio, en aĝo de 10 jaroj ĝis ... sed mi ne parolu pri la aĝo! Esperantistoj estas ja ĉiam junaj. En la kolegio estis tri kursoj: a) elementa, kie oni instruis laŭ la Ĉe-metodo. Partoprenis 15 komencantoj. b) por progresintoj, kun 21 lernantoj. c) supera kurso (seminario), kun 14 aŭskultantoj. Tie oni prelegis pri esp. historio, poezio, lingvistiko kaj praktikado. La aŭskultantoj de la seminario partoprenis ankaŭ lecionojn de oratora arto, kiun gvidis s.Slanina.

En nunjara kolegio instruis K.Šolc, A.Slanina, F.Pytloun kaj E.Suchardová. Prelegis R.Hromada, K.Píč kaj J.Mařík. K-do Zajíček, reprezentanto de OSAZ en Mladá Boleslav prelegis pri nova ĉeĥoslovaka lerneja plano. Krom la instruado (tri horojn antaŭtagmeze) estis ĉiutage abunda programo. Ni nomu nur plej gravajn okazintaĵojn. Ĉiam posttagmeze okazis ekskursoj al Ĉeĥa paradizo: al kasteloj Kost, Valečov, Humprecht, al la ruinoj Trosky kaj Valdštejn, al belaj banejoj, al la rokaro Prachovské skály ktp. Vespere okazis gajaj kaj kulturaj programoj: du dancvesperoj, somera karnavalo, vespero de sorĉistoj, dum kiu siajn sorĉojn prezentis membroj de "Magia Internacio Rondo - MIRO" s. Bery kaj Linhart, recita vespero "Amo en poezio" kaj arta vespero memore al granda poeto Fraňa Šrámek, kun prezento de montraĵoj el lia verko en ĉeĥa lingvo kaj en esperanta traduko de R.Hromada.

Filman vesperon aranĝis s.Ján Hajzok el Bratislava. Ĉiujn vesperojn gvidis s.Slanina kaj Linhart, aktive partoprenis s.Suchardová, Seman, Mařík, Mlejnek, Tauer, Zítek, Pytloun kaj ceteraj. Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj baris la vojon (kiel ekz. mona reformo kaj ŝanĝo de pagiloj) SEK bone sukcesis. Al Kost venis kvindekda fervoruloj, kiuj demonstraciis, ke nenio povas malhelpi, se la volo estas forta kaj la ideo alta.

S. dro Kamarýt salutis la kolegion per jena poemo:

En prave fama bela Kost	Mi predikas pri persist'.
somera kolegio nun furoras.	Kvindeko Kosta havas tiun virton
Ni levu glason por la tost'	ne emas dubi pri ekzist'.
dum blovas ventoj, dum la suno oras.	Akceptu danke esperigan mirton!

Responde al malsaĝa vok'
ni rajtas laŭte, multe malsilenti,
ke spite al cinika mok'
esp-ista devo estas eminenti.

HEROLDO DE ESPERANTO. Kun bedaŭro ni informas la legantojn de HDE en nia lando, ke la sendaĵoj de tiu gazeto nro 12 estis ĉiuj resenditaj al la administracio. Vere ni senpacience atendas, ĉu numero 13a estos al ni enmanigita!

- -

DANKON AL LA GAZETOJ KAJ REVUOJ, kiuj sendas al ni siajn eldonaĵojn! Ili meritas ne nur nian koran dankon, sed ankaŭ admiron kaj laŭdon de tuta esperantistaro. Nenion de ni ricevante interŝanĝe, ili daŭrigis en la liverado, por ke la esperantistaro ĉeĥoslovaka ne restu sen informoj. Esperantista klubo en Praha bone utiligas kaj plene elĉerpas la enhavon de la gazetoj kaj fine ilin laŭeble ankoraŭ disponigas al sia membraro.

Ricevitaj gazetoj: ARGENTINA ESPERANTISTO (numeroj 269, 270-271, 273-274) - AŬSTRIA ESPERANTO-REVUO (1,2) - BELGA ESPERANTISTO (1,2) - BOLETIN Valencia (1,2,3,4,5,6,7) - BRAZILA ESPERANTISTO (462-3, 464-5,466-7) - DANSK ESPERANTO BLAD (1,2,3,4,5,6-7) - DIA REGNO (3,5,6-8) - ESPERANTISTA LABORISTO (37,39) ESPERO KATOLIKA (422,423,424,425,427) - L'ESPERANTO Torino (18,19,20) - ESPERANTO EN SKOTLANDO (21) - FLANDRA ESPERANTISTO (1,3,5,9) - INFORMILO DE I.G.E.L. (1,2,3) - LA JUNA VIVO (11,12) - LABORISTA ESPERANTISTO (1,5) - MEZAMERIKA ESPERANTISTO (2) - NEW ZEALAND ESPERANTIST (130-1,132-3) - NORVEGA ESPERANTISTO (1,4,5) - LA PONTO (3,4,5) - LA PROGRESANTO (1,2,3,5,6,7,8) - LA REVUO ORIENTA (2,3,4,5,7) - SAMIDEANO (18,20,21) - SAT-AMIKARO (87) - SENNACIULO (578) - SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN (1,2,3,4,6-7) - STUDENTO (1) - THE BRITISH ESPERANTIST (573-4,575-6,577-8) - THE WORKER ESPERANTIST (74) - HEROLDO DE ESPERANTO liveras de ĉiu numero pli ol 130 ekzemplerojn, kiujn ni dissendas al donitaj adresoj en tuta respubliko. Ĉi tiu grandanima oferemo de s.Jung kaj subtenantoj meritas, ke ĝi estu per oraj literoj eternigita en la historio de Esperanto!

Fine ankoraŭ grava atentigo: Ne plu uzu malnovajn adresojn de "Esperantista" aŭ de EAĈSR, sed ĉiujn sendaĵojn kaj korespondaĵojn direktu al prezidanto de ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA s.Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, PRAHA I.

- -

EBLIGU PLUAN APERADON DE NIA BULTENO per dediĉo aŭ vendo de necesa papero, kiu ne estas nun normale aĉetebla. Ĉi tiun nian alvokon en pasinta numero sekvis jenaj gesamideanoj: Rajnyšová, Slanina, Echtner, Ing.Molnár, Jan Molnár, Vítovec el Vodňany kaj Hůda el Jihlava. Ilia rapida helpo ebligis al ni eldoni ĉi tiun numeron 4paĝa. Krom tio aliaj samideanoj ebligis al ni aĉeti la paperon, kiu kuŝis neuzata! Koran danko al ĉiuj! Tamen manko de la papero ne estas ankoraŭ forigita!

- -

Anĝeloj de sinjoro Hromek - rakonto de Jan Drda, aperis en japana lingvo en la nunjara junia nro de Sin Nihon Bungaku - Nova Japana Literaturo. La impona revuo portas tiun ĉi ambaŭlingvan titolon. La tradukon preparis laŭ esperanta teksto de A.V.Zedník nia japana amiko Tugu Kurisu. Aldonita estas bildo, kiun desegnis speciale por tiu ĉi japana traduko nia artisto O.Šembera.

- -

ESPERANTO POR BLINDULOJ. Antaŭ nelonge aperis en brajla preso vasta katalogo de esperantaj verkoj, troviĝantaj en porblindulaj bibliotekoj en Londono, Parizo, Hamburg, Leipzig, Marburg, Amsterdam, Haag, Grave, Kopenhago, Stokholmo, Vieno, Praha, Torino kaj Budapeŝto. Kutime estas, ke tiuj bibliotekoj pruntedonas siajn verkojn senpage al interesiĝantoj el ĉiu ajn lando. Ĉar la poŝttarifoj por brajlaĵoj estas ekstreme malaltaj, la blinduloj do povas disponi pri multaj verkoj en Esperanto (Espero Katolika, julio 1953)

- -

ALBUMO DE VIENO. La gastoj de la viena urbestro ricevas de li donace belan albumon kun bildoj de la aŭstria ĉefurbo. Tio konvenas en grandaj urboj. Specialaĵo estas tamen ke tekstoj sub tiuj bildoj estas en Esperanto. Oni memoru, ke la viena urbestro estas aktiva esperantisto.

ESPERANTO-KLUBO por infanoj. Oni nun preparas starigon de speciala E-klubo por infanoj en Kopenhago (La Juna Vivo jul.-aŭg. 1953)

- -

LA PLEJ SUDA ESPERANTO-KONGRESO EN LA MONDO okazis 2 - 4 aprilo 1953 en Bahia Blanca - Argentino. Estis vere ĝoja kaj sukcesa kongreso, kiu alportis plifortigon al Argentina Esperanto-Movado. Dum la kongreso oni solene inaŭguris buston de Zamenhof, kiun skulptis samideano Enzo Redolfi. En la nomaro de nove elektitaj komitato kaj konsilantoj de Argentina Esperanto-Ligo kun plezuro ni legas nomon de s.Sonja Portnová de Milkuschutz - iama membrino de EK en Praha en la tempo antaŭ la dua mondmilito. Al ŝi, ŝia edzo kaj ĉiuj ceteraj gesamideanoj niajn sincerajn salutojn!

- -

INTERNACIA INFANVILAĜO. En la gimnastika altlernejo Lillsved, 35 km de Stockholm estas dum unu monato aranĝita "internacia somera vilaĝo por infanoj". 60 infanoj el 10 landoj kolektiĝis tie por vivi kune, por eksenti internacian komprenon kaj ĉefe por servi kiel objektoj por studoj psikologiaj rilate al internacia kunvivado.

Marde la 18an de aŭgusto vizitis la infanvilaĝon s. Malmgren, Lapenna, Dupuis, Hakansson kaj B.Joelsson laŭ invito de la prezidantino de la sveda sekcio por internaciaj infanvilaĝoj, s-ino B.Juhlin-Dannfelt. Estis rezervita loko en la programo por diskuto kune kun la gvidantoj/instruistoj el diversaj landoj pri la problemo de internacia lingvo. Enkondukis prof.Lapenna per lerta paroladeto en Esperanto pri la problemo kaj ĝia historio kaj pri espo, interpretate en la anglan lingvon (laŭ interkonsento) de s.Hakansson. Post tio s-ro Dupuis faris provlecionon laŭ Ĉe-metodo; tio estis tra ŝatata de la ĉeestantoj.

En la sekva diskuto, kiu estis sur alta nivelo, kvankam la angla lingvo tie uzata estis tre mankohava, ni renkontis ordinarajn argumentojn, sed la atmosfero estis tre favora kaj oni volonte aŭskultis niajn vidpunktojn kaj multrilate konsentis kun ni. Entute tiu diskuto estis tre agrabla. S.Juhlin-Dannfelt finis ĝin dirante, ke ŝi ja kutimis iom rideti pri Esperanto, sed ke ŝi nun ekhavis tute aliajn konceptojn pri ĝi; krome ke ŝi multon komprenis el tio, kion ni diris esperante.

Post la lunĉo estis aranĝata provleciono por la infanoj, post kiu s.Dupuis restis en la vilaĝo dum 14 tagoj por lecionoj al la infanoj. Ni estas certaj, ke la gvidantoj ne pentos tiun decidon.

El Svenska Esp. Tidningen, n-ro 8-9

- -

Pensoj kaj aforismoj:

Ne evitu la virinojn dum via juneco, se vi ne volas kuri post ili, stulte kaj ridinde, dum via maljuneco.

-

Se inteligenta homo parolas malŝate pri idealistaj aferoj, tio signifas, ke li estas filistro maskita je deca persono.

- Ambaŭ de S.R.Cajal, Boletin, n-ro 7.

Enigmo

Mi estas en patro, ne estas en la filo, jes en patrino, ne en filino.

Mi estas en tablo, ne en la seĝo, min havas infano, sed ne la reĝo.

Kio estas mi?

- - -

Eldonkvanto de tiu ĉi numero: 700 pecoj.

Oka numero aperos komence de novembro 1953.

Kontribuaĵojn sendu al s.Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.